# VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti, pro členy kroužku a příznivce mezinár. jazyka.
Odpovědný redaktor – MUDr. Josef Hradil, 29501 Mn. Hradiště č.1161
Povolil ONV Mladá Boleslav, odb. Kultury 47/87-403/16
Podávání novinových zásilek povoleno Oblastní správou pošt Střední Čechy v Praze, č.j. P/Fiš—2295/92 ze dne 16.XI.1992.
xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx
Numero 1 Januaro 1993 Leden Číslo 1
xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

Kuraĝon gesamideanoj! Ĉi jara jarŝanĝo alportis al niaj movadanoj multajn zorgojn. Ne nur doloran disigon de nia respubliko, sed ankaŭ financiajn limigojn, pri kiuj multaj opinias, ke ili povas grave priminaci nian ekziston. Eĉ se nia asocio devos forlasi sian bele situitan modestan oficejon en Jílská strato (Prago) eĉ se ni devos pagi je 50% altigitan membrokotizon, eĉ se nia aktiveco en skribkontaktoj estos limigita por triobla altigo de poŝtelspezoj, eĉ se niaj mizeraj vivkondiĉoj precipe de rentistoj malaltigos niajn elspezojn por kultura satigo de niaj bezonoj, tamen ni klopodos trovi rimedojn por teni viva nian movadon, ĉar ideo de Esperanto ne povas malaperi, ĝi estas senmorta! Sed ni ne forgesu, ke nia forto ne bazas en kvanto da membroj, sed en ilia kvalito. Eĉ se ni ne trovos okazon por renkontiĝo pro multekosta trafiko kaj konferencelspezoj, ni hejme studu diligente kaj profundigu niajn lingvosciojn, por ke ni povu sukcese varbi novajn samideanojn. Ne nur interna ideo de Esperanto estas senmorta, sed ankaŭ la celo, kiu ni lernis nian lingvon – internacia interkompreniĝo.

Odvahu, samideáni! Letošní přelom roku přinesl našim příznivcům hnutí mnoho starostí. Nejen bolestivé rozdělení naší republiky, ale i finanční omezení, o kterých se mnozí domnívají, že mohou vážně ohrozit naši existenci. I když naše asociace (svaz) by musela opustit své krásně položené sídlo v Jílské ulici (Praha), i když budeme muset platit o 50% zvýšení členský příspěvek, i když naše aktivita v písemných stycích bude omezena pro trojnásobné zvýšení poštovních poplatků, i když naše bídné životní podmínky především důchodců zmenší výdaje na kulturní nasycení našich potřeb, přece budeme se snažit najít prostředky k udržení života našeho hnutí, protože idea Esperanta se nesmí ztratit, je nesmrtelná. Avšak nezapomínejme, že naše síla nespočívá na množství členů, ale jejich kvalitě. I když nenajdeme příležitost k setkání pro drahou dopravu konferenční vydání, doma studujme pilně a prohlubujme naše jazykové znalosti, abychom mohli úspěšně dělat nábor nových samideánů. Nejen vnitřní idea Esperanta je nesmrtelná, ale také cíl, kvůli kterému jsme se učili našemu jazyku: mezinárodní dorozumění.

Konferenco de ĈES en Pardubice (23.-25.X.92) informis membraron pere de iliaj delegitoj, kiuj ĉeestis, pri movadaj aktualaĵoj. Jen kelkiuj: Membrokotizoj altiĝos je 50%. - Malgrandiĝis partopreno en renkotiĝoj kaj membrobazo de ĈEA (1500 pagintaj), eĉ nombro de vendita literaturo, tamen ankaŭ elspezoj asociaj. Pliboniĝis informiteco; laŭdo de STARTO (Malovec+Daněk). Estis
pripensata event. forlaso de Jílská strato. Necesas 1x jare aranĝi grandan konferencon. IFEF savis ĈEA-on. Ankaŭ eksterlanda partopreno en Antaŭkongreso helpis. Pro tio estas planata kuna kongreso de ĈEA kaj Germana EA en Karlovy Vary (Pentekosto 93 28.V.-31.V.) en Termal – multe kosta; sed loĝado ebla ankaŭ en metilernanta instituto (150 litoj). Sabate: ĉefaj labortemoj, raportoj. Dimanĉe: fakaj sekcioj. Lunde: ekskursoj. Supozata partopreno de 150+150 membroj. Altigo de membrokotizoj de ĈEA: necesas klarigi al la membra bazo. - Kion faras la asocio por ni? Legislativo. Vendado de presaĵoj. Eldono de STARTO. Dotacioj de agado. Organizado de konferencoj. Perado de partopreno en internaciaj aktivecoj. Preso de unu numero de STARTO kostas 6Kčs. Poŝtelspezoj. 18Kčs jare por UEA – kolektiva membreco. Rezulto - necesas altigi membrokotizojn: kat.A (aktivaj membroj) 120Kčs, B (rentistoj nelaborantaj) 60, - C mecenatoj, D+E 30, enskribo 20.- Sume: altiĝo de 50%.

Konference ČES v Pardubicích (23.-25.X.92) informovala členstvo prostřednictvím delegátů, kteří byli přítomni, o aktualitách. Zde jsou některé: členské poplatky se zvýší o 50%. Nižší účast na setkáních. Snížila se členská základna ČES (1500 platících), i počet prodané literatury avšak také výdaje svazu. Zlepšila se informovanost; chvála STARTa (Malovec+Daněk). Bylo uváženo event. Opuštění sekretariátu v Jílské ulici. Je zapotřebí 1x ročně uspořádat velkou konferenci. IFEF zachránil ČES. Také mezinárodní účast na Předkongresu pomohla. Proto je plánován společný sjezd českého a německého svazu do Karlových Varů (svatodušní svátky 28.-31.V.) v Termalu – drahé; ale ubytování bude možné též v učňovském internátu (150 lůžek). V sobotu: hlavní pracovní témata, zprávy. V neděli: odborné sekce. V pondělí: výlety. Předpokládaná účast 150 a 150 členů.

Zvýšení členských poplatků ČESu: je nutno členům vysvětlit. - Co pro nás svaz dělá? Legislativu. Prodej tiskovin. Vydává STARTO. Dotace činnosti. Organizace konferencí. Zprostředkování účasti na zahraničních aktivitách. Tisk jednoho čísla STARTa stojí 6 Kčs. Poštovné. 18 Kčs ročně pro UEA – kolektivní členství. Důsledek: je nutno zvýšit členské poplatky: kat.A (aktivní člen) 120 Kčs, B (nepracující důchodci) 60 Kčs; podporující členové D+E 30.-, zápis 20. - Souhrn: zvýšení o 50%.

Ĉeĥaj refleksivaj verboj ne estas ĉiuj refleksivaj ankaŭ en Esperanto, t.e. ne havas apude pronomon si (sin), ekzemple:
Zvratná slovesa česká nejsou všechna zvratná v esperantu, tj. nemají u sebe zájmeno si (sin), například:
báti se = timi (nikoliv timi sin); diviti se = miri; domnívati se = supozi; hádati se = disputi; hněvati se = koleri; hoditi se = taŭgi; chovati se = konduti; krčiti se = kaŭri; líbiti se = plaĉi; mazliti se = dorliti; odříci se = rezigni; plaziti se = rampi; posmívati se = moki; potiti se = ŝviti; přestaviti se = imagi; smilovati se = kompati; týkati se = koncerni; vztahovati se = rilati; k.a. = kaj aliaj = a.j. (el lernolibro de Julie Ŝupichová. Z učebnice Julie Šupichové.)

GRAMATIKA VORTARETO

Se vi volas bone paroli esperante, neniam forgesu lerni gramatikon, plej bone el la lernolibro de Malovec (havebla ĉe la asocio por 20 Kčs). Tamen multaj gramatikaj terminoj ne estos por vi konataj; jen la vortareto, kiu helpos vin:
Chcete-li dobře mluvit v esperantu, neopomeňte se učit gramatiku, nejlépe z učebnice Malovcovy (k dostání na svazu za 20 Kčs)! Avšak mnoho termínů gramatických nebude Vám známých: zde je proto slovníček, který Vám pomůže:

adjekto – příslovečné určení
adjektiva aŭ poseda pronomo – zájmeno přivlastňovací
adjektivo – přídavné jméno
adverba adjekto – příslovce způsobu
adverba numeralo – číslovky příslovečné: unue, due ...
adverbo - příslovce
afikso – pří-pona a předpona
afiksoidoj – ĉiuj afiksoj, kiuj kondutas kiel radikoj ĉe kunmetado
aglutina lingvo – kunmetanta vortojn regule
agverbo – esprimas ideon pri agado
akcento - přízvuk
akcesota tempo – složený čas
aktiva voĉo – činný způsob
akuzativa adjekto – akuzativní příslovečné určení
akuzativo – čtvrý pád
apostrofo - apostrof
artikolo - člen
aspekto – slovesný vid
atribuo - přísudek
baza numeralo – číslovka základní
citiloj – signoj, disigantaj frazelementojn
daŭra aspekto aŭ durativo – přípona trvajícího času
deklinace - skloňování
demanda propono – tázací zájmeno
demanda propozicio – tázací věta
demandsigno - otazník
denta konsonanto – souhláska zubní
derivita adverbo – devenanta el alispecaj radikoj
dezira propozicio – devenanta el alispecaj radikoj
difina (difinita) artikolo – člen určitý
diftongo – dvojhláska (eŭ, aŭ)
divido streko – rozdělovací znaménko
dupunkto - dvojtečka
durativo aŭ daŭra aspekto – AD – ekz. sidADI lernADI
eksploda konsonanto – b, p, v, t, g, k
eksplodo-frota konsonanto – c, dz, ĉ, ĝ
epiteto - přívlastek
etimologio – nauka o původu slova
faktivo – faktiva voĉo -IG-
fiktiva modo – kodicionál, podmiňovací způsob
fina aspekto – perfektivo (fin-, pret-, sat-, tut-)
finaĵo - koncovka
finitivo – pura verba formo, infinitiv
flua konsonanto – l, r

fonetiko – zvukosloví, výslovnost
frazelemento – větný člen
frazo – (kunmetita) propozicio
frota konsonanto – f, v, s, z, ŝ, ĝ, ĵ, h, ĥ
futuro – estonta tempo
gingiva konsonanto – dásňová souhláska: s, ŝ, ĵ, ĉ, ĝ
gorĝa konsonanto – k, g, ĥ
halstostreko - pomlčka
imperfekto – minulý čas, děj nedokončený (anta)

indika modo, indikativo – oznamovací způsob
indika propozicio – oznamovací věta
infinitiva adjekto – infinitivo en funkcio de adjekto
infinitivo – neurčitý způsob

inkoativo aŭ komenca aspekto – ek-; (ek-dormi, sidiĝo)
interjekcio - citoslovce
interpunkcio – apartigantaj signoj
interativo aŭ ripeta aspekto -re-; refari, relegi
komo - čárka
komparativo – druhý stupeň (adverbií, adjektiv)
kompleksa aŭ rilata tempo – agado ne finiĝis: estas konstruata
kompleksa predikato – přísudek rozvitý
komplemento - doplněk
kondicionalo – podmiňovací způsob
konjugacio - skloňování
konjukcio – spojka souřadná
konsonanto - souhláska

kopulo – spona (relatigvorto: esprimas rilaton inter iu (io) kaj ĝia kvalito, ekz.: esti, aspekti, ŝajni)
korelativo – vztažné jméno (tabelvorto)
krampoj - závorky
signorie - vykřičník

kvanta adverbo – nur, pli, plej, tre, ju - des
kvazaŭnomo - oni
laringa konsonanto - ĥ

leksikologio – scienco pri vortoj

libera vortordo – libovolný slovosled
ligita vortordo – vázaný slovosled
lingvoelemento – jazykový prvek
lipa konsonanto – b, p, f, m, v
lokadverbo – ekz. ĉirkaŭ, for ktp.
manieradverbo – příslovce způsobu
medialo - -IĜ- mediala voĉo
modalo (modo) - způsob
momentaneo aŭ momenta aspekto -EK- sendaŭro
montra pronomo – ukazovací zájmeno
morfologio - tvarosloví
multenombro – pluralo; množ. číslo
nea pronomo – tabelvortoj komenciĝantaj per NEN-
nedefina pronomo – neurčité zájmeno (iu)
nerekta objekto – nepřímý podmět
netransitiva - netransitivní
nominativo – 1.pád
numeralo - číslovka
objekto - předmět
orda numeralo – číslovka řadová

ordona - rozkazovací
palata konsonanto – souhláska patrová
participo - příčestí
pleonasmo – vorto en superflua formo
pluralo – multenombro; množné číslo
poseda aŭ adjektiva promono – přivlastňovací zájmeno
predikativo - doplněk

predikato - přísudek
prefikso - předpona
prefiksoido – prefikso, kiu kondutas kiel radiko ĉe kunmetado kontraŭregule: dis-, ek-
prepozicio - předložka
prepozitivo – předložkový pád
prepozitiva adjekto – předložkové příslovečné určení
preterito – minulý čas

prezenco – estanta tempo, přítomný čas
primitiva adverbo estas deklinebla (ekz. hodiaŭ, jam ktp)
primitiva propozicio – holá věta
pronono - zájmeno
propozicio – ĉiu aparta vortgrupo, esprimanta kompletan opinion
punkto - tečka
punktokomo - středník
radiko - kmen
refleksiva pronomo – zvratné zájmeno (si – por la tria persono)
rekta infinitiva adjekto – příslovečné určení přímé (neurčité)
rekta komplemento – přímý doplněk
rilata pronomo – komencas per k- (ekz. kiu, kie)
rilata ( akcesora, kompleksa) tempo – složený čas (estas /-is, os/… anta /-inta, -enta)
relatigverbo - kopulo
semantiko aŭ semasiologie - významosloví
senpersona pronomo (kvazaŭnomo) – oni, iu ajn, kiujn ajn
sensubjekta propozicio – bezpodmětná věta (Pluvas)
silabo - slabika
singularo – jednotné číslo
sintakso – scienco pri frazkonstruo
statverbo – esprimas ideon pri stato
subjekto – podmět
subjunkcio – spojka podřadná
substantiva numeralo – číslovka zpodstatnělá
substantiva sufikso – zpodstatnělá příp- ona (-aro, -ono)
substantivo – podstatné jméno
sufiĉo kaj neceso – gramatika regulo
sufikso - přípona
sufiksoido – ne obeas al reguloj de vortkunmeto
suplemento – přívlastek neshodný
sumigpronomo – p. komencanta per ĉ.
superlativo – třetí stupeň
supoza modo - kondicionalo
tabelvorto – vztažné zájmeno
tabelpronomo – tabulkové zájmeno
tempadvervbo – příslovce času
tempo - čas
transitiva - přechodný
tripunkto - přechodný
ununombro (singulaturo) – jedn. číslo
verbo - sloveso
voĉo – způsob (trpný, činný)
vokalo - hláska
volitivo – rozkazovací způsob
vortordo – slovosled
vortspeco – druh slova

<u>Poemo pri Ĉeĥoslovakio.</u>

Tempo pasas, memoroj restas
Dum mia labortag'
pri vi, Ĉeĥoslovak'
Mi pensas, kaj revadas.
Ĉar dank' al Esperanto
vian landon mi konas,
vian popolon ŝatas.
    Pro mia amikec'
    pro nia lingvo Esperanto
    reveni mi promesis,
    sonĝon efektivigis,
    kaj dank' al Esperanto
    geamikoj revidis!
Kelkajn landojn mi konas,
ĉiujn popolojn ŝatas,
sed Ĉeĥoslovakion
danke al Esperanto,
al Vi mia animo.

For de mia patrujo
Franclando amata!
Malproksime de vi -
lando Ĉeĥoslovakio.
En Svislando mi vivas,
laboron mi ordigas,
infanojn mi prizorgas
pri vi - Ĉeĥoslovakoj
mi pensas kaj revadas!
    Ĉar dank' al Esperanto
    du patrujojn mi havas -
    bel' - Ĉeĥoslovakion
    kaj Franclandon amatan!!

Odette Fregonara
9 MUSY – 1200 Genevo, Svisio
(jam forpasinta)

5-a Internacia Kultura Festivalo okazis en la ĉeĥa urbo Ústí nL honore al la literaturistoj Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr 2.-4.an de oktobro. Pri ili solene parolis Jaroslav Mařík kaj prof.Dro Vl. Novobilský. Ĉeestis ĝemelklubanoj el Kronach (Bavario) kaj el Saksio. Krom informoj kaj turismo estis projekciita kolora filmo pri japan-esperantista geedziĝo en Prago kun ĉeesto de esperantistoj el kvar kontinentoj, partoprenantoj de la Oficiala Antaŭkongreso, en kiu Esperanto rolis pontlingve (V.Novobilský), kaj ĝuis altnivelan kulturvesperon, age de kantistoj kaj muzikistoj el la ŝtata operejoj de Prago kaj Ústí, okjara majstrino Urbanová kaj deklamon de aktorino E.Seemannové. Huraan aplaŭdegon rikoltis ĉefine fascina prezento de „Figaro fare de M. Smyčka. (Raportas J. Mařík).

Kuriozaĵo el la festivalo Ústí: S-ano Míla Jíra, esperantist-estro el Jablonec nN, nin informis, ke li, la klubanoj kaj amikoj dissendos nunjare ĉiujn siajn bondezirojn okaze de la Kristnasko, Nova Jaro kaj eĉ Pasko 1993 sume kvarobla altiĝo de poŝtmarka afranko de bildkartoj“

Agrablan semajnon pasis partoprenintoj de Esperanto-tendaro Oŝelín ĉe Stříbro fine de aŭgusto. Amikeca samideana restado kaj etoso en ĉarma natura medio ebligis bonegan ripozon. Ne mankis ekskursoj en belegan ĉirkaŭaĵon, konversaciaj lecionoj kaj vesperaj tendarfajroj. Al organizintoj el E-klubo Plzeň, precipe al J.Vomáčka (tendarestro) kaj A.Schröterová (ĉefkuiristino) en nomo de kontentaj partoprenintoj dankas Mirek Severa, 47001 Česká Lípa, Lukostřelecká 2188.

EL POPOLA ĈINIO estas abonebla ĉe firmao LA ESPERO, poŝtkesto 34, 69662 Hodonín – por 12 numeroj 430 Kčs, provnumero 10 Kčs!
RATÍŠKOVICE 1993 – renkontiĝo de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj, organizata de E-klubo Vracov dum tagoj 24.-26.IX.93 en la regiono de folkloro, popolartoj kaj bona vino. Pluajn detalojn petu ĉe s-anino Jana Melichárková, 69602 Ratíškovice 938, distr. Hodonín. Ŝi organizas ankaŭ TRADICIAN PRINTEMPAN RENKONTIĜON en Ratíškovice sabate la 17an de aprilo 1993. Eblas ankaŭ tranokti – nepre aliĝu! Vl.Hasala.

E-klubo en Prago solenis sian 90-jaran jubileon en la tagoj de 20a ĝis 22a de novembro. Ĉio komenciĝis vendrede vespere en la klubejo en Vejvodová str, kie alvenintoj interkonatiĝis kaj babilis. Sabate matene oni promeniris de „Nám.míru“ al Heroldovy Sady“ kie pririgardis ŝtonon kun E-surskribo (monumento)… Tilio enplantita jam dufoje en proksimeco, bedaŭrinde sekiĝis. Post tagmanĝo en la restoracio „Na Zvonařce“ rakontis Jaroslav Mařík pri historio de la klubo. En kultura programo oni aŭskultis novajn poemojn de akademianino Eli Urbanová recititajn de E. Seemannová, violonĉelan koncerton prezentitan de s-ro Jedlička, juna interpretisto; sekvis tombolo kaj dancado. Por dimanĉo estis preparitaj tri promenoj: al Vyšehrad, Malnova Urbo kaj Karola Ponto kun domsignoj en Neruda Strato. Vespere okazis la plej grava aranĝo: partopreno en „Video-stop“ kun 43 gastoj el esp.klubo en Prago. Konkursantoj estis konataj aktoroj Bartoška, Zedníček, Lipský, kaj nin -esperantistoj- reprezentis D.Kočvara el Ostrava, Mirek Severa el Č.Lípa kaj Květa Hubnová, klubestrino el Prago, kiuj pruvi, ke krom E-on ili bone scipovas nian filmkreadon. La gajninto, Květa Hubnová, prezentante la tri konkursantojn, pravis dirante: „Ne pravas, kiu el ni venkos; la celo estas interese kaj altnivele prezenti kaj reprezenti E-on.“ Por tiu programo devas E-klubo pagi 20.000 Kčs, ĉar laŭdire ĝi estas reklamo – VIDEOSTOP apartenas al la plej servataj programoj de la ĉeĥa televido. Tre valoraj estis enkondukaj vortoj de D.Kočvara, kiu prezentis E-on al la aŭskultantoj, el kiuj multaj jam supozas, ke E-o estas lingva kuriozaĵo ja forpasinta.

Ni esprimas publikan dankon al s-ano Vladimír Krmela el Šumperk, ĉar li senpage sendis grafikajn proponojn de titoloj por niaj rubrikoj.

Ĉu vi ne kapablas antaŭpagi eksterlandanajn gazetojn? Skribu, ni prunte donos ilin al vi nur kontraŭ poŝtelspezoj.

S-ano Vlado Sládeček raportas pri partopreno en 65a kongreso de SAT en Kaŭnaso, Litovio: Ni veturis per „Trabanto" al unua en mia vivo SAT-kongreso kiun dum la tagoj 5.-15.VIII.92 partopreni 600 personoj el 30 landoj. Dum ĝeneralaj kunsidoj la anaro decidas pri agado por estonta jaro. Okazis kunvenoj de liberecana, liberpensula, naturamika, literatura, junulara kaj vegetarana sekcioj, kun ĉiuvesperaj kulturaj programoj. Antaŭvespere nia ostrava triana grupeto kantis kun gitaro multajn tradukitajn kantojn kaj poste aliĝis ankaŭ aliaj. La gazeto „Kongresvoĉo" skribis, ke ostravanoj ekkantigis tutan kongreson. Okazis tri ekskursoj: al natura muzeo, al ĉefurbo Vilnius kaj televida turo, en kies proksimeco antaŭnelonge perdis vivon 17 homoj kaj 600 estis vunditaj. Tria ekskurso estis perŝipa al Balta maro. La ŝipo estas konstruita tiel, ke la sidlokoj estas sube. Homoj povas vidi nur suprojn de armiloj. Mi supreniris ferdekon, sed tuj mi aŭdis krion kaj pafadon. La ŝipanoj tiris min suben kaj tradukanto klarigis, ke sur unu bordo estas litovanoj, sur la dua rusoj, kiuj supozas, ke mi volas spioni kaj averte pafis en aeron. Revenante hejmen, ni staris apudlime pli ol 25 horojn. La kontrolado estas malrapida. Kelkiuj havis dolarojn aŭ markojn kaj donis al policano, kiu poste per radio anoncis, ke veturas malsana homo, kiu urĝe bezonas kuracistan helpon. Kiu ne havis okcidentan monon, devis atendi en la vico. La restado kostis 10 dolarojn, t.e. 300 Kčs (por ĉiuj malmulte). Rublo perdas sian valoron. En Litovio por unu persono estas monate 1 kg da faruno kaj 1 kg da grio. En Rusio 1 kg da sukero, ½ kg da salo, 5 skatoletoj da alumetoj, 1 lt da oleo por tri monatoj. Homoj vivas mizere, la vendejoj estas malplenaj. Ĉe la limo staras multaj fi-fraŭlinoj, kiuj proponas sin kaj volas plibeligi longan atendadon.

S-anino Ludmila Klegová protestas, ke ni informis, kvazaŭ estus en Ostrava nur unu E-klubo en Vítkovice. La dua klubo en O.-Poruba estas same vigla: lektoras s-ano Sládeček al 8 novaj lernantoj, 1x monate estas prelegoj kun diapzitivoj, kantado, estas gvidata kroniko. Ni pardonpetas!

KiEL DiRi? Praktika esperanta frazeologio de Lentaigne: KOMPAROJ:

> Barakti kiel fiŝo ekster akvo. Danci kiel kato ĉirkaŭ la poto. Drinki kiel truo, spongo, funelo (trychtýř). Ekscitiĝi kiel bolanta lakto. Esti por iu kiel patrino. Esti kiel fiŝo en akvo. Fali ĉiam plandalsube kiel kato. Gapi kiel bovido. Gardi iun kiel la pupilon de sia okulo. Helpi kiel hirudo (pijavice) al mortinto. Konduki iun kiel ŝafidon al la buĉo.

KORESPONDI DEZIRAS: Mallongiloj (zkratky): bk=bildkartoj; ĉt=ĉiu temo; d=deziras; iŝ= interŝanĝas; its=interesiĝas; jj=jaroj; kol=kolektas; kor=korespondi; m=muziko; pm=poŝtmarkoj; tm=tutmonde.

Norberto Mollo, Assemblia 480, RA-6100 Rufino, Argentino, E-instruisto kun lernantoj, tm, ĉt.

E-klubo en Kalisz serĉas klubkontaktojn tutmonde. Serbinowska 25, PL-62800 Kalisz.
Societo de Handikapuloj de HEA ( koresponda adreso: Imre Hegedüs, Béke utca 53, H-4024 Debrecen serĉas kontaktojn kun eksterlandaj handikapuloj. Bicikloj por handikapuloj specialaj: kuplitaj (unu sidas flanke de alia – sanhelpa turismo kaj rekapabliĝo); triciklo por plenkreskuloj, ekz. por epilepsuloj. Esperanta priskribo LOPLOD, Vítkova 5, CS 18600 Praha 3.
La revuo (ESPERANTA LITERATURO) serĉas kunlaborantojn kaj perantojn tm P.O.K. Shashi, Hubei, Ĉinio.
La Aŭstria E-junularo kunvenas ĉiun duan lundon en la Esperanto-ejo, A 1180 Wien, Paulinengasse 13, Stiege 3, Rufanlage.
25 kursfinintoj serĉas kontaktojn kaj helpo per sendo de E-literaturo (gazetoj, vortaroj). „Verda spegulo“, BP 108, Kinshasa, Zairo.
E-instruisto petas sendi linbrojn, gazetojn. S-ro Joseph Janvier, Port-aa-Prince, Haiti. Helpu al novaj esperantistoj!
Ekologoj kontaktu Yao Afantchao-Biakou, BP 20225, Lomé, Togolando, Afriko.
Petoj por helpo per sendo de litaraturo: Malajzia Esperanto Asocio, Chan Sook Wai (f-ino), 1008 Jalan Selesa 4 Happy garden, 58200 Kuala Lumpur, Malasio. - Indonezia EA, J1.Tm Pringgodani dalan 11 Nro 11, Semarang 50141, Indonezia.
S-ano Ulpiano Villanueva, AvBolivia 221-2 o piso, Lima 1, Pero, tm, ĉt.
S-ano Julio Roberto Mazariegos Arana, 12 Calle 18-03 Edif C Apto 312, Modulo III.Cond. Nimajuyu, Guatemala, Mona 21 – k pri protestantismo
S-ano Christopher Fettes, St.Columba s College, Nathafarnham, Lublin 16, GIRE, instruisto, pri vegetarismo, angle, esperante.
Evis Gusmari, fraŭlino, 20jj, studentino, Rr Wine Peza, Fali 2000, shkl,ap.7 Tirana, Albania, kun ĉiuj landoj.
Esperanto-klubo, C.P.235, Sorocaba,, Brasil d korespondantojn por anoj.
Classe de Ecole Publique, Esp.groupe, F 63390 St.Gervais d'Auvergne.
S-anino Hildengunde Stamm, Feldgraben 26, A-6850 Dornbirn, Voralberg.
S-ano Leston C.Buell, Villa maha, 37 Sh 104, ET.11451 L1 Maadi, Cairo, instruisto de lingvoj, pri muziko.
xmxmxmxmxmx

xmxmxmxmx
xmxmxmx
xmxmx
xmx
x

Esperantský klub
29501 Mnichov Hradiště

Podávání novinových zásilek
povoleno oblastní správou pošt
Střední Čechy v Praze, cj. P/Fiš
2295/92 ze dne 16.XI.1992